

**ĈEA-KONGRESO EN
PROSTĚJOV
24.-26.10.2014**



DUA INFORMILO

Estimataj gemembroj,
proksimiĝas la dato de la plej pinta
ĉiujara aranĝo de ĈEA, al kiu ni
volus elkore inviti vin kaj alporti
precizigajn informojn.

OKAZLOKOJ:

1) Studenthejmo (Domov mládeže),
Palečkova 1 (kie ni loĝos, manĝos
kaj kie okazos vendreda vespera
programo kaj dimanĉa antaŭtag-
meza programo

- disponeblos manĝejo kaj klubejo
(por du paralelaj aranĝoj) situantaj
ĉ. 200m de la loka trajnstacidomo
kaj ĉ. 400 metrojn de la urbocentro,
el la ĉefa kaj busa stacidomoj ating-
eblas per urbobusoj 19 kaj 32.

2) Salonego de Domo de servoj
(Dům služeb), Olomoucká str. (kie
okazos oficiala laborprogramo sa-
bate antaŭtagmeze kaj kultura pro-
gramo sabate vespere) situanta je
distanco de 10-15 minutoj piede de
la studenthejmo.

LOĜKONDIĈOJ:

La loĝlokon multaj el vi jam konas,
ĉar en ĝi i.a. oni tranoktis dum
solenaĵoj kaj aranĝoj de la loka
klubo. Plimulto de la ĉambroj estas
3-litaj (ekipitaj per nova meblaro)
kaj entuta kompleta kapacito estas
66 litoj. Tamen necesas dekalkuli
lokojn, se aliĝos geedzaj paroj aŭ
por 4-litaj ĉambroj, se neniu aliĝos
por ili, kio la kapaciton malpliigos.
Pro tio ni petas vian komprenemon,
ke ĉefe oni loĝos triope (aŭ 4-ope se
oni preferos) kaj ke sole geedzoj
rajtos postuli loĝi duope kontraŭ
krompago.

Same pro tio nur al unuaj 50
aliĝintoj (espereble iom pli) ni
povas garantii loĝadon tie kaj petas
vin aliĝi frue. Pli postaj interesitoj
loĝos en similaj kondiĉoj, sed ne
kun la ĉefa grupo!

Plejmulto de virinoj okupos la 1-
an etaĝon, por ke komunaj neces-
sejoj/duŝejoj tie servu sole al ili,
dum por viroj servos la 2-a etaĝo.

La lokon kaj kondiĉojn mem
elektis kaj aprobis la pasintjara
konferenco konsiderinte avantaĝan
prezon kaj nur 2 tranoktojn.

En esceptaj kazoj eblos uzi ŝarĝ-
lifton. Al interesitoj pri pli luksa
loĝado ni rekomendas mem aranĝi
EUROPENSION el Olomoucká
112

[\(http://www.europension.wz.cz/\)](http://www.europension.wz.cz/).

MANĜOJ:

Okazos trifoje tage en manĝejo de la studenthejmo. La prezo estas sendube tre avantaĝa, eĉ pli, se vi mendos la manĝojn komplete ene de "pakaĵeto".

Ni esperas, ke vi utiligos la oferton, ĉar la servo realiĝos sub kondiĉo, ke ni mendos de ĉiu manĝo almenaŭ 40 porciojn.

Kiel kutime, eblos mendi ankaŭ senviandan varianton.

PREPARATA PROGRAMO:

Vendrede posttagmeze – akcepto, loĝigo, laŭinterese konversacia rondeto aŭ kunveno de laborgrupoj/sekcioj.

Vendrede vespere – filma/literatura/kleriga/muzika programo.

Sabate antaŭtagmeze – jarkunveno kun raportoj, diskutoj kaj balotoj por la sekva trijara periodo.

Sabate posttagmeze – promeno kaj urbotrarigardo, laŭbezzone post la 16-a horo daŭrigo de la labortraktado.

Sabate vespere – koncerto de vakera muzikgrupo Marodi el Ostrava kaj de konata Esperanta "bardo sen barbo" Georgo Handzlik kaj kompreneble ankaŭ balo kun riĉa tombolo.

Dimanĉe antaŭtagmeze – asociaj celoj por la nova periodo, diskutoj.

URBOTRARIĜARDO:

Dum la urbopromeno vi povos konatiĝi ne nur kun vidindaĵoj de la ĉefplaco kaj kun gotika preĝejo de Avancigo de Sankta Kruco, sed i.a. kun altvaloraj konstruaĵoj en stiloj de secesio kaj konstruktivismo, kiuj estas

la urba specifaĵo kaj fieraĵo. Inter ili certe ne mankos secesia Nacia domo, projektita de Jan Kotěra, kiun ni trarigardos ankaŭ interne. La nuntempan urbodomon multaj ĈEA-membroj jam vizitis, do ĉi-foje vi havos la eblecon vidi la eksan renesancan urbodomon kaj ev. ankaŭ viziti en ĝi situantan Urban muzeon. Nelastvice ni vizitos ankaŭ Esperantan ekspozicion en la kinejo METRO.

ALIĜOJ:

La aliĝilon vi povas sendi per klasika poŝto, sed **preferinda vojo estas per interreto** – la aliĝilon vi trovos en <http://www.esperanto.cz/aligxilo2014>

Ĉeĥlingvan aliĝilon (identan kun tiu en Starto) vi povas elŝuti en

<http://www.esperanto.cz/cs/akce/celosvatni-sjezd-ceskeho-esperantskeho-svazu-651.html>.

La plej avantaĝajn kondiĉojn ĝuos aliĝintoj ĝis la 15-a de septembro 2014! Ne forgesu la eblecon atingi senpage novan legitimilon de ĈEA aŭ senpagan legitimilon por la urba trafiko, sed nur por aliĝoj ĝis 30.9.2014!

Ĉiuj ĝustatempaj aliĝintoj ricevos supozeble komence de oktobro trian informilon kun konfirmo kaj pli precizaj informoj inkluzive mapeton, trafikan atingebilon, precizan programhoraron ktp.

**NI ĜOJATENDAS SINCERE
RENKONTIĜON KUN VI!**